

Redakta Komitato: D-ro A. Albault, M. Ĝivoje, Prof. J. Görlich,
D-ro P. Neergaard, Prof. B. Popović, Prof. S. Reiersöl, C. Stöp-Bowitz.
Ĉefa kaj respondeca redaktoro Prof. B. Popović, Teknika fakultato,
NIŠ, Jugoslavio

Eldono de INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA
Aperas kvarfoje jare. Jarabono 30 steloj = 7,5 Ned. gld. = 2,2
dol. = 25 N. Din

Por membroj de I. S. A. E. la jarabono 25 steloj (la jarkotizo 10 steloj)
La abonojn kolektas la landaj delegitoj de ISAE
(La listo troviĝas sur la lasta kovrilpaĝo)

Izdaje nauĉna sekcija Saveza esperantista Jugoslaviye, Dobrinjska 12,
Beograd (=jugoslovenska podružnica Međunarodnog naučnog društva
esperantista). Za izdavaĉa: odgovorni urednik Prof. Dr. Bož. Popović,
(Tehnički fakultet, Niš)

ŝtampano u Grafičkom preduzeću »ŠTAMPA«, Sarajevo; za ŝtampariju
Simo Bunčić.

SCIENCA REVUO

UDK 001 (05) = 408.92
Vol. 17
N-ro 1 (65)
30. 5. 1966.

Aperas kvarfoje jare. Jarabono 30 steloj = 2,2 us. dol. = 25 N. Din.

Enhavo:

M. W. Pietrzak: Interlingvistiko
R. Sikorski: Freŝa vento en lingvoscienco
J. Chvosta: Reformo de kalendaro
A. Kapusi: Arteriosklerozo — popolmalsano
R. A. Lewin: Kultivo de Zoothlorella apartigita el spongo

001.92 : 008 : 401 + 408.9

INTERLINGVISTIKO — scienco aŭ iluzio?*)

(M. W. Pietrzak, Varsovio, Pollando)

Ni vivas en la socio, kiu pli kaj pli kuraĝe rigardas en la
estontecon de la mondo kaj pli kaj pli vizie formas la realecon kaj
ankoraŭ en revoj konkretigas bildon de la homa socio por la jaro
2000, 2100 ktp. Oni parolas pri alia aspekto de sociorganizo, pri
ekskursoj al planedoj, pri komuna merkato, komunaj bezonoj,
komuna lingvo..

Kreskas interesiĝo por interlingvo

En multaj enketoj farataj en la lastaj jardekoj granda plimulto
de la enketitoj estas por akcepto de unu lingvo internacia uzata kaj
instruata apud lingvo nacia.

*) Internacia Scienca Studenta Seminario, TORUN, 14-17-an de aprilo 1966.

Tiu fakto estas natura rezulto de la ĉiam pli akriĝanta problemo de la interkompreniĝo en internaciaj kongresoj kaj konferencoj, komerco, scienco, diplomatio kaj turismo. Aliflanke, jam de jardekoj, kelkfoje eĉ de jarcentoj, jen certaj naciaj lingvoj provas plenumi la rolon de la internacia komprenilo, jen aperas projektoj de artefaritaj internaciaj lingvoj. Aparte fondiĝas landaj kaj internaciaj organizaĵoj, evoluigas eĉ tutaj movadoj por akcepto de tiu aŭ alia lingvo kiel internacia; tiuj lingvoj estas instruataj, eldoniĝas en ili vortaroj, lernolibroj, romanoj, poezio, sciencaj verkoj. Ĉiam pli da homoj okupiĝas pri tiuj lingvoj utiligante ilin en la internaciaj rilatoj. Entute kreskas interesiĝo pri interlingvo. Tamen tiu interesiĝo plej ofte ne baziĝas sur objektiva, scienca scio pri la interlingvaj fenomenoj, sed grandparte limiĝas al konkludoj kaj nepravaj propraj ĝeneraligoj, kelkfoje tre modestaj aŭ troheligitaj »vivospertoj«. Ofte nia scio pri interlingvo kaj la problemo mem de interlingvo baziĝas sur hazarda tralego de informoj pri iu projekto de lingvo internacia, ac sur t.n. »ĝenerala opinio« pri internacia taŭgeco de la angla, aŭ germana, aŭ franca lingvo sur tiu aŭ alia kontinento, en tiu aŭ alia branĉo de la homa aktiveco. — informoj, en sia amaso pseŭdo-sciencaj, modaj aŭ malnoviĝintaj, **senigitaj** de elementaj postuloj de scienco, t.e. de objektiva rigardo sur la traktatan demandon. Entute, krom la sporade aperantaj artikoloj en kelkaj revuoj, mankas publikaĵoj, kies celo estus prezenti al la legantaro la rezultojn de nuntempaj modernaj sciencaj esploroj pri interlingvo, absolute mankas prilaboraĵoj sistemigantaj niajn neeviteble ankoraŭ fragmentajn sciojn pri la kompleksa kaj riĉa mondo de la interlingvistikaj fenomenoj.

Tiu ĉi manko de sistema prezento de la akiraĵoj de scienca interlingvistiko unuflanke elfluas el la fakto, ke la interlingvistiko mem estas scienco tre nova, nematura. Ĝenerale la homoj ne scias kio ĝi estas, plej-multo da homoj ne havas eblecon renkontiĝi kun ĝi, kun la problemo de interlingvo. Sed ankaŭ aliaj, tiuj, kiuj estas adeptoj de tiu aŭ alia interlingvo, do tiuj, kiuj interesiĝas praktike pri la problemo de internacia lingvo, ne ĉiam scipovas orientiĝi science eĉ pri la interlingvo, kiun ili mem akceptas. Fine tiuj teorie kaj tiuj ĉi praktike interesiĝantaj pri la problemo de internacia lingvo, pri interlingvoj kaj pri la scienca rigardo al tiuj demandoj, ne scipovas ĉirkaŭbraki la kreskantan nombron de publikaĵoj kaj problemoj starantaj antaŭ ĉiu, kiu interesiĝas pri tiu teorie interesa kaj praktike grava problemaro de interlingvo.

Tiujn do, ĉiam pli nombrajn kategoriojn de memlernantoj, reprezentantaj same la maljunan kaj junan generaciojn de la homoj celantaj — ne malofte kun obstino kaj inter grandegaj malfacilaĵoj — al ekkono de la vero pri la fenomenoj de intrelingvo, oni devas orientigi en ĝia problemaro kaj sistemigi la aferojn konatajn aŭ malmulte aŭ malbone.

Kial disvastigi interlingvistikajn interesiĝojn?

Iu tamen povas demandi: por kio disvastigi interlingvistikajn interesiĝojn? Ĉu tio ne estas faktoro superflua aŭ malboninflua, arte firmiganta la dividon de la socio je kontraŭbatalantoj kaj subtenantoj de la ideo pri interlingvo? Se komprenebla ŝajnas la evoluigado de esploroj pri interlingvo inter lingvistoj (ĉar la praktiko pravas, kiel granda estas ofte nescio pri interlingvo inter plimulto de lingvistoj) kaj inter ĉiuj, kiuj praktike okupiĝas pri la disvastigado de interlingvo (ekz. esperantistoj, idistoj k.s.), tiom vastigado de scio pri interlingvo inter neokupiĝantaj pri interlingvo povus ŝajni neprava.

Okazanta de tempo al tempo en la gazetaro la diskuto pri la problemo de internacia lingvo kaj pri la indiferenteco kontraŭ tiu problemo kaŭzis eĉ kelkaj konvinkon, ke la plej bona maniero venki la dividon de la socio je subtenantoj kaj kontraŭuloj de interlingvo kaj samtempe la plej bona metodo solvi la problemon de lingvaj malfacilaĵoj estas ŝtata kaj interŝtata oficiala enkonduko de tiu aŭ alia lingvo en la internaciajn rilatojn. En tia kompreno la vekigado de interlingvaj interesiĝoj fariĝos ne nur io tute superflua, sed malkaŝe malutila, ĉar ne helpas la firmigadon de unueca opinio pri iu konkreta lingvo.

Tiaspeca starpunkto kaj argumentado, ŝajne prava, ne rimarkas tamen vicon da gravaj momentoj. **Unue** la adeptoj de unuopaj projektoj de interlingvo, kaj speciale la gvidantoj de koncernaj organizaĵoj kaj movadoj ne povas rezigni pri la komento kaj profundigado de scio almenaŭ en la sfero de propraj lingvoj kaj ties influoj. **Due**, estas por neniuj sekreto, ke ĝenerale lingva problemoj havas multajn aspektojn, kiuj klare montras neblon akcepti unu aŭ plurajn naciajn lingvojn kiel internaciajn. Ne necesas ĉi tie ripeti jam tre bone konatajn faktojn pri la mizeraj rezultoj de la lerneja kaj universitata instruadoj de fremdaj lingvoj malgraŭ la elspezado por tio de grandegaj sumoj, ne necesas ankaŭ tie ĉi ripeti la konfliktojn, kiujn kaŭzas superregado de unuj lingvoj naciaj super la aliaj. Interesiĝantojn pri tiu problemoj mi petas rigardi en la disertaĵon de Prof. D-ro Lapenna »Lingva Problemo en la Internaciaj Rilatoj«, Rotterdam 1963, CED-UEA. **Trie** la bezono de sciencaj, objektivaj interlingvistikaj interesiĝoj devas konstante kreski samtempe kun la neevitebla proceso de integriĝado de la landoj, blokoj politikaj kaj ekonomiaj. Dum tiu ĉi proceso kreskas bezonoj de facila internacia interkomprenilo. Tamen akceptante la fakton de integrado oni ne povas forgesi pri la rajto de ĉiuj nacioj al la kultura aparteco. Tiun kulturan apartecon certigas i.a. nacia lingvo kiel portanto de nacia kulturo. Ankaŭ oni ne povas nei la rajton de la popoloj defendi sin kontraŭ kultura supereco de alia lando kaj ja tia tendenco tute nature staras malantaŭ la nacia lingvo

disvastiĝanta en fremdaj teritorioj. Tamen unuflanke neniuj ŝtatoj kontraŭ neniuj prezoj volas rezigni pri la privilegia pozicio kiun akiris ĝia lingvo en internaciaj rilatoj (angla, franca, rusa, hispana, germana, ktp.), aliflanke kreskas nombro de vastiĝantaj naciaj lingvoj (araba, hindi, urdu, swahili, itala, nederlanda, pola) kaj tiuj lingvoj volas ankaŭ atingi privilegian pozicion. Konsiderante, ke tiuj procezoj ne estingiĝos survoje al sia evoluo, la demando de kunekzistado de kulturoj, lingvoj naciaj kaj neblo de la enkonduko de lingvo nacia en internaciajn rilatojn, devas pli aŭ malpli frue ekstarti en la centro de la socia atento. La fuĝado for de la problemo, kiun proponas indiferentuloj, ne estas samsignifa kun ĝia solvo. Oni devas do teorie prilabori kaj kompreni la fundamentojn de interlingvistiko en la monda socio uzanta pli ol 2800 lingvojn! Kvankam oni povas kaj devas substreki, ke la principoj kaj normoj de interlingvistiko kaj kompreno de la supre prezentitaj aspektoj de la lingva problemo en la mondo naskiĝas jam en la socia praktiko, ni tamen bone scias, ke la praktiko ne limigita de teorio ne ĉiam devas iri laŭ bonaj vojoj, kaj almenaŭ ne dum longa tempo.

Iu malpacienulo tamen povas denove demandi: =Por kio ĉio ĉi?= Kion interlingvistiko havas komunan kun kulturo, politiko, integrado?= Jes, ĝi havas! Neniu scienco ja povas evolui sen taŭga, favora »klimato«, socia kompreno, ĉar ĝi ne evoluas en vakuo, en izoleco i.a. de sociaj politikaj fenomenoj. Simile, kiel evoluo de ĉiu scienco ligiĝas koherente kun koncerna historia situacio, kun la socia mondo, ankaŭ la evoluo de interlingvistiko fosas al si vojon en la mondo al pli vasta socio. Alivorte, temas pri tio, ke la kresko de interlingvistikaj interesiĝoj en la mondo ne estas nur elpensado, ia deziro de interlingvistoj, arte disblovantaj la problemon, sed la rezulto de la objektiva soci-historia neceso, konkreta situacio, en kiu vivas la hodiaŭa homo.

Ni substreku ankaŭ, kaj tio estas afero ne malpli grava, ke la interlingvistikaj interesiĝoj faras pli kaj pli grandajn rondojn, ekz. en Usono: kaj ja tie la gvidaj fortoj de la socio devus ne allasi al ilia evoluo, ĉar devus scii, ke interlingvo estas evidenta konkurenco al la angla, al la usona kulturo kaj politiko. Sed kiam ni ragardos la interlingvajn publikaĵojn en la Okcidento (ekz.: vidu: =The International Language Review=, Usono, =Esperanto= — la organo de UEA, =Progreso= — la organo de Unio por la Lingvo Internacio — Ido,), kvanton de Universitatoj enkondukantaj Esperanton, organizaĵojn kaj societojn interlingvajn, kongresojn de adeptoj de interlingvoj, centrojn de esploroj pri interlingvoj, interlingvojn mem — ni ne diras jam tie ĉie pri la agado de diversaj sciencaj, politikaj kaj religiaj organizaĵoj akceptantaj interlingvon — ni ne povas ne agnoski, ke scienca scio pri interlingvo, interlingvistiko — konstruas por si vojon al la socia konscio de multaj popoloj, ke ĝi estas objektiva bezono de la nuntempo.

Uzante terminon ni devas ĝin difini. Kio estas interlingvistiko? Pri kio ĝi okupiĝas? Kiajn ĝi utiligas metodojn? Tiaj kaj similaj demandoj interesas nin ĉiam, kiam ni komencas esplori ian sciencon. Tamen oni ne povas difini interlingvistikon ne konante ĝian objekton

kaj antaŭ ol ni ne orientiĝos pri ĝia aparteco kaj memstareco. De multaj flankoj povas aperi demando, ĉu interlingvistiko estas fakte scienco aŭtonomia. Tia estas sorto kutima de novaj sciencoj. Ĉiu renkontiĝis kun tiaj postenoj, kiuj ne komprenante specifecon de koncerna scienco rifuzas ĝiajn rajtojn al memstareco. En nia kazo sufiĉe ofte oni opinias aŭ limigas interlingvistikon al certa parto de lingvokonaj meditoj aŭ al »filozofado« pri la estonteco de la evoluo de la lingvoj. Tiel do unuaj opinias, ke pri projektoj de interlingvoj ne valoras okupiĝi, ĉar tio estas senbezona por la konanto aŭ lernanto de naciaj lingvoj, aliaj asertas, ke la homo, kiu ne estas subtenanto de tiu aŭ alia projekto de interlingvo povas diri pri ĝi nenion sencan. Ankoraŭ aliaj neas apertecon de la scienca interlingvistiko sur tiu bazo, ke ili dispecigas ĝian enhavon kaj volas transdoni unuopajn ĝiajn partojn al aliaj sciencistoj opiniante, ke la historio de interlingvoj estas parto de la historio de lingvoj naciaj aŭ historio de kulturo, la sociologio de la movadoj por interlingvoj — parto de sociologio, la psikologio de tiuj projektoj kaj movadoj — eltondaĵo de psikologio, ktp. Ne malofte fine, precipe laste, pro la fakto, ke kun pli granda iniciativo de esploroj pri la projektoj de interlingvoj elpaŝis esperantistoj kaj anoj de aliaj movadoj por interlingvo, oni komprenas interlingvistikon kiel certan formon, parton aŭ aspekton de tiuj movadoj aŭ kiel propagandon de la projektoj de artefaritaj lingvoj. Ni do vidas, ke la demando de aŭtonomio, aparteco de la scienca scio pri interlingvoj aŭ pri la movadoj por interlingvoj ne apartenas ankoraŭ al aferoj klaraj. Ĉar tio estas problemo gravega, tial, antaŭ ol ni komencos preparoli la objekton, enhavon kaj metodojn de nia scienco, decas klarigi tiun ĉi aferon. Ŝajnas, ke plej facile estas kompreni la apartecon de interlingvistiko ekkoninte la diferencojn, kiuj okazas inter ĝi kaj du aliaj branĉoj, nome lingvoscienco kaj movadoj por interlingvoj.

Interlingvistiko kaj lingvoscienco

La malfacilaĵo estas tiaspeca, ke ambaŭ tiuj branĉoj okupiĝas pri lingvaj fenomenoj, kaj kunigas ilin historia ligo kiu ĝis antaŭnelonge ekzistis inter ili. Se temas pri la dua momento — interlingvistiko nur tiam fariĝis scienco, kiam fine de la 19-a kaj komence de la 20-a jarcento la projektoj de internaciaj lingvoj akiris amasojn de adeptoj kaj uzantoj, kiam akriĝantaj lingvaj malfacilaĵoj en la internaciaj rilatoj fariĝis kaŭzo por serĉi solvon de tiu ĉi problemo sur vojo de la enkonduko de lingvoj artefaritaj. Ĉar en pli antaŭaj kaj plej novaj tempoj ankaŭ inter protagonistoj de lingvoj naciaj kiel internaciaj kaj simile inter la lingvistoj interesiĝintaj pri tiu demando, kaj ankaŭ inter protagonistoj de unuopaj lingvoj artefaritaj, interlingvistikon oni opiniis parto de lingvoscienco. Nur laste lingvistoj parte ŝanĝas tiun opinion. Ankaŭ adeptoj de interlingvoj artefaritaj ne orientiĝas en la demandoj de la ekesto kaj evoluo de tiuj lingvoj kaj ne sentas bezonon de esploroj tiudirektaj. Se temas pri la unua momento: nedividado de interlingvistiko de lingvoscienco surbaze de tio, ke ambaŭ branĉoj okupiĝas pri la lingvo — ni substrekas, ke kompreneble pri la interlingvo interesiĝas ne nur scienca scio pri ĝi — interlingvistiko, sed ankaŭ

aliaj branĉoj de la homa scio. Tio estas komprenebla, ĉar interlingvo estas ligita kun multaj aspektoj de la socia vivo kaj devas interesiĝi pri ĝi multaj diversaj sciencoj. Precipe tamen lingvistiko ŝajnas esti tiu branĉo, kiu estas antaŭdestinita al la ekskluziva esplorado kaj komprenado de la esenco de interlingvo tial, ke kiel montras la nomo mem ĝi estas lingvo kaj oni asertas, ke pli bone komprenas lingvode-mandojn lingvisto ol esploranto nur de projektoj de internaciaj lingvoj. Ja »interlingvistoj ne komprenas la regulojn de lingvo-evoluo«. Oni uzas demagogian argumenton ke interlingvisto troviĝas en situacio de blindulo disputanta pri koloroj. Ja kontraŭe oni povas uzi simile demagogian argumenton asertante, ke ja malsana je tuberkulozo ne devas serĉi tuberkuloz-malsanan kuraciston, ĉar la sana kuracisto ankaŭ =komprenas= la malsanulon kaj scias la malsanon, ĝuste rekonas ĝin kaj kuracas. Ja necesa kondiĉo de ĉiu esplorado scienca estas ĝuste nenio alia ol kiel eble plej objektiva starpunkto kontraŭ la analizataj fenomenoj, dume tian starpunkton estas tre malfacile teni al lingvisto, interesigita por pruvadi la ĝustecon kaj =verecon= sed nur kaj ekskluzive de sia propra teorio pri =natureco= de lingvoj naciaj. Je tiu ĉi momento turnas la atenton la eminenta interlingvisto Mario Pei, teoriulo de la Esperanto-Movado — Ivo Lapenna, lingvoscienculoj kiel Collinson, Collinder kaj aliaj. Tial ni konstatas tie ĉi, ke lingvisto ne povas esti aŭtentika scienca esploranto de lingvoj artefaritaj kvankam aliflanke oni ne povas opinii, — kiel tion faras pli fanatikaj adeptoj de lingvoj artefaritaj — ke ĉiuj konkludoj de lingvistoj pri artefaritaj lingvoj devas esti falsaj. La sciencon scion pri artefaritaj lingvoj — interlingvistikon — povas evoluigi same poruloj kaj same kontraŭuloj de interlingvo, ili nur submetiĝu al la elementaj postuloj de la ĝenerala scienca posteno. Ja al neniu el esperantistoj aŭ subtenantoj de la angla lingvo falos en la kapon ideo riproĉi al eminenta esperantista esploranto de Volapük kaj Occidental, la ĉina aŭ franca, ke li okupiĝas pri tiuj lingvoj, kvankam li mem ne kredas ke tiuj lingvoj estos universale agnoskitaj kiel internaciaj.

Interlingvistiko esence diferencigas de lingvistiko. Ne sufiĉas la fakto mem, ke ambaŭ branĉoj okupiĝas pri lingvo. Temas pri tio, kiamaniere ili okupiĝas. Dirante plej ĝenerale, la diferencojn inter lingvistiko kaj interlingvistiko oni povas enhavi en jenaj punktoj:

1) Interlingvistiko okupiĝas pri interlingvo — do pri artefaritaj lingvoj dum lingvistiko okupiĝas pri lingvoj naciaj kiel portantoj de naciaj kulturoj.

2) El la supra evidentiĝas, demando de lingvo internacia. Al lingvo internacia oni starigas aparatajn kondiĉojn, kiujn ne povas plenumi iu ajn lingvo anticipe. Eĉ poliglotoj devas kompreni, ke la kompetenco koncerne lingvoj naciaj ĉu artefaritaj ne donas al ili kompetencon koncerne la problemaron de interlingvo. Tial tiu ĉi demando postulas apartajn studojn, simile kiel juro internacia apud juro nacia, kaj neniu povas aserti, ke specialisto pri nacia juro estas kompetenta koncerne la juron internacian.

3) La tria esenca diferenco inter lingvistiko kaj interlingvistiko estas ligita kun la antaŭa. Se por interlingvisto interlingvo prezentiĝas kiel principa esplor-objekto — lingvisto kondukas alie. Li dividas lingvojn je =naturaj= kaj artefaritaj, anticipe opinante sentaŭgecon de tiuj aliaj, kaj se li vidas klare la problemon de lingvaj malfacilaĵoj, tiam deziras solvi ĝin helpe de unu el la lingvoj naciaj.

4) Lingvistiko fine okupiĝas, kion oni devas speciale substreki — nek pri la pruvado de bezono enkonduki interlingvon artefaritan, nek — aliflanke — pri la elmontrado, ke tia lingvo entute povas ekzisti. Kontraŭe interlingvistiko pravas, ke ekzistas problemoj de internacia lingvo kiun oni povas kaj devas solvi helpe de lingvo artefarita, ke tia lingvo povas ekzisti, evolui, fine interlingvistiko en certa senco kontribuas al la kreado de kiel plej bone akceptebla internacia lingvo artefarita.

Interlingvistiko kaj la movadoj por interlingvo

Ĉiu projekto de interlingvo grupigas ĉirkaŭ si adeptojn, kiuj en sia plejmulto opinias, ke ĝuste ilia lingvo estas destinita por solvi la lingvan problemon. En tiu ĉi kazo elmontri la diferencon inter tiuj movadoj kaj interlingvistiko ne estas malfacile. Unue tiuj movadoj ne starigas antaŭ si pure sciencon problemon, alprenas je si la taskon prezenti sian lingvon kiel plej bonan solvon de la problemoj kaj utiligas metodojn de informado, instruado kaj praktika utiligo. Tiu ĉi agado povas servi kiel unu el objektoj de interlingvistikaj esploroj. Due, eĉ se tiuj movadoj kaj organizaĵoj por interlingvoj disvolvas esplorojn pri interlingvo, oni povas sendube konsideri tiujn esplorojn kiel unuflankajn al kiuj mankas objektiveco kaj senpartieco, des pli kiam tiuj esploroj estas farataj sur idea fono. Kompreneble, kiel ni jam montris, oni ne povas nei pravecon de iliaj esploroj entute, kontraŭe, interlingvisto povas kaj eĉ devas konsideri ilin kiel bazon por la scienca pritrakto, tamen li devas tion fari senpartie kaj obejktive. Por doni al niaj eldiroj pli da klareco oni povas enkonduki novan nocion de **interlingvologio**. En nia kompreno ĝi estus branĉo de scienco aŭ scienca agado de interlingvaj movadoj, kiu okupiĝas nur pri unu interlingvo, simile al lingvistiko okupiĝanta nur pri unu lingvo nacia. Kaj tial lasante jam flanken la interlingvan movadon ni okupiĝu pri elmontrado de diferencoj inter interlingvologio (t. e. esplorado de Esperanto, aŭ Ido, aŭ Neo) kaj interlingvistiko.

1) Tiel do interlingvisto okupiĝas pri ĉiuj interlingvoj, dum interlingvologio estas aŭ Esperantologio, aŭ Idologio aŭ Neo-logio. Kaj tio estas la unua diferenco inter tiuj branĉoj.

2) Elfluas el tio sekva diferenco, nome la demando de =vero=. Interlingvisto kun ĉiam sama =bonkoreco=, sen emocioj esploras pasigrafiojn kaj la lingvojn parolajn. Interlingvologo, se ni jam lin tiel nomis, dividas interlingvojn en =ĝustajn= kaj =malĝustajn= kaj depende de la aparteno al tiu aŭ alia movado li aprezos nur unu lingvon, tiun, kies proulo aŭ reprezentanto li mem estas kaj al la aliaj li rifuzos =ĝustecon=.

3) Konkludante el la supra ni venas al la tria diferenco inter la scienca interlingvistiko kaj interlingvologio. Ni ja povas demandi: kio por interlingvisto estos =vero= en la demandoj de artefarita lingvo? Kaj tie ni trovas la diferencon kies eco estas tio, ke interlingvistiko estas scienco priskriba, empiria, t. e. branĉo de scio, kiu baziĝas sur la materialo prenita el la observado kaj eksperimento, do sur la empiria materialo. Interlingvistiko okupiĝas pri kontroleblaj priskriboj kaj fiksado de la regulecoj en la interlingvaj fenomenoj, dum la argumentoj de interlingvologio havas celon konvinkigi al koncerna interlingvo kaj elmontri taŭgecon de tiu interlingvo sendepende de eksperimento (sperto).

Oni devas nun klarigi ankoraŭ unu dubon. Ofte okazas ke interlingvologio interesiĝas ne nur pri la propra interlingvo sed ankaŭ pri la aliaj, ke ĝi montras ne nur kiun interlingvon oni devas akcepti, sed ankaŭ kiujn interlingvojn oni ankoraŭ akceptas en diversaj rondoj. Tamen tiuj ĉi faktoj ne malheligas la diferencon inter ambaŭ branĉoj: ĉar interlingvologio interesiĝas pri aliaj interlingvoj ne unuavice, sed krome kiel pri la ekzemploj kial oni ne devas ilin akcepti, kaj kiel pri premisoj por la esplorado de la propra interlingvo. Ĉar interlingvologio ne celas, pro la naturo mem de sia karaktero, nur vastigon de la scio, sed elmontron (ofte pere de priskribo de la faktaj statoj) de erareco de aliaj interlingvoj. Alivorte interlingvologion interesas ne tiom momentoj ekkonaj, kiom la =defendaj=, la sekurigado de la =propra= interlingvo antaŭ la atakoj kaj duboj flanke de aliaj interlingvologioj kaj scivoluloj aŭ simplaj kontraŭuloj. Tiel do Esperantologio aŭ Interlingua-logio okupiĝas pri analizo, interpreto kaj ekspliko de principoj de unu unuopa interlingvo. Ekzistas do kvanta kaj kvalita diferenco inter la rilato, metodoj kaj celoj de ambaŭ branĉoj: ĉu la objekto de la esploroj estas unu interlingvo ĉu la vario de ili, ĉu la metodo devas esti modeliga, (idealiga), ĉu priskriba. La praktiko montras ankaŭ, ke interlingvologio postulas forigon de propra lingvo el la esploroj kaj tiel subfosas la fundamentan kondiĉon de la sciencaj esploroj pri interlingvo: la komparan okupiĝadon pri ĉiuj interlingvoj. Interlingvologio do opinias sin ununura branĉo de interlingvaj esploroj kaj uzurpas al si ekskluzivecon de esploroj pri aliaj interlingvoj. Alivorte interlingvologio forigas kompetencon de interlingvistiko krom la propra aŭ limigas ĝin nur al la aliaj, kaj ne al la =propra= interlingvo.

Objekto de interlingvistiko

La supra analizo de la rilato de interlingvistiko al la du plej gravaj =konkurencaj= faktoj ankaŭ okupiĝantaj pri interlingvo permesos al ni solvi la demandon de la memstareco de interlingvistiko kiel scienco, pli bone kompreni ties objekton.

Laŭ tio kion ni diris la afero ŝajnas simpla: interlingvistiko estas scienca scio pri interlingvo. Sed ĉu ekzistas io tia kio nomiĝas interlingvo entute? Ja ni renkontas konkretajn, historie prezentitajn lingvojn kaj kodojn, kaj kiel ne estas homo entute, t. e. tia, kiu

estus nek s-ro X, nek s-ro Y, kiu ne estus la konkreta persono, same ne estas ia interlingvo entute, kiu ne estus Esperanto, Ido, Novial, BoABoMu, NEO aŭ alia speco de iu konkreta lingvo. Tial oni devas difini la objekton de interlingvistiko pli singarde, nomante per tiu ĉi nocio sciencon pri ĉiuj fenomenoj interlingvaj, sciencon pri ĉiuj lingvoj artefaritaj (ekzistantaj hodiaŭ kaj formortitaj). Interlingvistiko estas do scienca, empirisma scio pri interlingvo komprenata kiel aro da ĉiuj interlingvaj fenomenoj. Ĝi estas scienco kaj ne kolekto da sciaĵoj pri interlingvo; ĝi estas ankaŭ scienco empirisma, do tia, kiu baziĝas sur eksperimento. Interlingvistiko, kiel ĉiu empirisma scienco kolektas do kaj determinas unue faktojn. Tiuj faktoj devas esti kontroleblaj kaj kontrolitaj. Ne estas do objekto de interlingvistiko ĉiuj tezoj kiel =ekzistas interlingvo natura= aŭ =ekzistas bezono de interlingvo natura=. Ne estas ankaŭ objekto de interlingvistiko pruvi =neekziston de interlingvo natura= pri kio ofte koncentriĝas la komencantaj interlingvologoj. Estas ja vaste konate, ke oni ne povas pruvi =neekziston= de io, aŭ pli precize: objekto de neniuj scienco povas esti negativaj, ekzistivaj asertoj. Interlingvistiko do, okupiĝas pri esploroj de la deveno de artefaritaj lingvoj (interlingvoj) kaj evoluo de tiuj lingvoj depende de la kondiĉoj, kiujn ili plenumas kontraŭ la efektivaj bezonoj de la socio, de la kondiĉoj sociaj, ekonomiaj, politikaj.

Tamen la esploro, priskribo kaj sistemigo de faktoj estas ĉiam nur kamenco de scienco. Ĝusta celo de interlingvistiko estas ĝeneraligo de la sciencaj faktoj, determino de la evoluaj regulecoj de la interlingvaj fenomenoj, Kompreneble, sciencistoj ofte restas ĉe la nura kolektado kaj ordigado de faktoj kaj neniuj pro tio plendas kontraŭ ili. Ni rimarku tamen, ke la veran scienciston karakterizas antaŭ ĉio la emo al histori-kompara komprenado de la fenomenoj kaj do farado de ĝeneraligoj (konstruado de hipotezoj, teorioj kaj fine formulado de evolu-reguloj de konkreta parto de realaĵo) — cetere tion oni povas trovi en ĉiu lernolibro enkondukanta en la metodikon de iu ajn scienco. La restado ĉe nuraj faktoj povas elflui el multaj kialoj. Povas ekzemple esti esprimo de la frua evolu-etapo de koncerna scienco, la simptomo de ties nematureco. Por povi fari ĝeneraligon, oni devas unue kolekti sufiĉan faktan materialon, la fazo de kolektado devas en la scienco antaŭigi la fazon de ĝeneraligoj. Interlingvistiko troviĝas ankoraŭ en tia frua evolu-stadio. Kiel scienco tre juna ĝi ne sukcesis ankoraŭ priskribi multajn faktojn, nek ordigi ĉiam pli kreskantan materialon de interlingvaj fenomenoj. Sed la restado sur tia etapo de la evoluo, limigado al faktologio povas havi ankaŭ alian motivon: povas deveni el la akceptado de certa koncepto de scienco, t.n. priskriba. Ĝi karakteriziĝas, ĝenerale dirante, per tio, ke la sciencon oni samtaksas sole kun la plena priskribo de faktoj, ke oni opinias ke la celo de scienco estas ĝisfunda kolekto kaj priskribo de ĉiuj faktoj el koncerna branĉo de fenomenoj. Tia malkorekta koncepto de scienco ekzistas ankaŭ en interlingvistikaj rondoj.

Nun ni povas pli bone kompreni celon de la scienca esplorado de interlingvo, la objekto de interlingvistiko. Ĉe la priskribo de faktoj ĝi okupiĝas pri elkaptado de la evolu-regulecoj de interlingvo, elprenado de tio, kio estas komuna, (aŭ pli bone, tio, kio estas ĝenerala), en ĉiuj interlingvoj. Ĝuste pri tiuj komunaj al ĉiuj interlingvoj ĝeneralaj regulecoj de ilia evoluo aperantaj sub diversaj aspektoj ni pensas, kiam ni parolas pri interlingvo ĝenerale. Kaj do, la objekto de interlingvistiko estas esplorado de interlingvo kaj ideo de internacia lingvo, tio estas esplorado de certaj sociaj fenomenoj (interlingvaj) kaj determinado de evolu-regulecoj de tiu ĉi tuta sfero de la socia vivo.

Kaj se jes, ni jam havas solvitan aferon de la memstareco de interlingvistiko, respondon al la demando, ĉu interlingvistiko estas aŭtonomia, aparta scienco. Estas, ĉar ĝi havas propran objekton de esploroj. Ĉar malgraŭ ke pri interlingvo okupiĝas diversaj branĉoj de scio, ne estas inter ili tia, kiu konsiderus ĉiujn fenomenojn tra prismo de interlingvaj esploroj (komprenataj kiel supre), kiu elprenadus el ĉiuj sociologiaj fenomenoj iliajn aspektojn kaj problemaron interlingvan, kiu farus la samon koncerne la lingvajn fenomenojn entute. Por ĉiuj aliaj sciencoj esplorado de interlingvo, ideo pri interlingvo, interlingvaj movadoj kaj ties agadrezultoj estas aŭ estos nur unu el multaj problemoj pri kiuj ili okupiĝas. (Ekz. Roman Dobrzyński skribis disertacion pri la esperantista gazetaro el vidpunkto de ĵurnalismo, kiu ja estas aparta, branĉo de scio kaj scienco).

Aparta afero helpanta ĝuste kompreni la objekton de interlingvistiko estas anstataŭigado de la nomo de interlingvistiko per »historio de artefaritaj lingvoj«, kio estas respeguliĝo de limigado de la objekto de interlingvistiko al ties parto. Tiu fakto havas evidente siajn historiajn premisojn: la kompara historio de interlingvo estis kaj estas la unua fako de la nov-ekstinta scienco, interlingvistiko empirisma; ĝi superas ĝis nun la aliajn interlingvistikajn disciplinojn per la kvanto da verkoj. Ni rimarku tamen, ke la analizo de kaoso en la nomoj de objektiva scio pri interlingvo ne havas ekskluzive kolektecan, antikvaĵecan karakteron: ĉar malantaŭ ĝi sin kaŝas malkaŝo de la difinita koncepto, tezo, ke ekster la kompara historio de interlingvo fakte ne estas interlingvistiko. Pri la erareco de tiu koncepto oni ne devas tro paroli post la prezento de la antaŭaj pruvoj, tie ĉi ni nur aldonu, ke antaŭ nelonge tiaj nomoj kiel fiziko aŭ biologio ne estis konataj kaj oni parolis pri historio (=historio de la naturo=) difference de la homa historio. Ĝuste do ĉiuj sciencoj okupiĝas pri historio de la koncerna, esplorata de ili flanko de realaĵo, des pli tamen neniu ekdeziros difini lingvistikon kiel esploron de historio de la lingvoj.

La kompara historio de interlingvo estas nur parto de interlingvistiko, ĉar apud ĝi intertempe elkreskis aliaj sciencoj, havantaj alian vidpunkton je interlingvaj fenomenoj, kiel ekz. socioologio de interlingvo aŭ psikologio de interlingvo.

Priparolante la problemon de la objekto kaj memstareco de interlingvistiko kiel scienco, ne eblas preterlasi la demandon: Kian lokon okupas la scienca scio pri la ideo de interlingvo, interlingvaj movadoj kaj ties agadrezultoj inter aliaj sciencoj, de kiu pli granda familio de sciencoj ĝi estas parto. En la lumo de niaj ĝisnunaj konsideroj la raspondo fariĝas sufiĉe klara. — interlingvistiko estas unu el la sciencoj sociaj, precipe ĝi estas parto de sciencoj pri kulturo, kulturscienco. Interlingvo ja estas, — kiel ni jam substrekis — esenca elemento de la multifaceta komplekso de la homa aktivado, tial loko de la scienco pri interlingvo povas esti nur inter la sciencoj okupiĝantaj pri tiu sfero de la sociaj fenomenoj kia estas kulturo. Ne hazarde do, plej intimaj ligiloj kunigas interlingvistikon ĝuste kun aliaj fakoj de kulturscio kiel socioologio, psikologio.

Metodoj de interlingvistiko

Ĉiu scienco, krom sia objekto, do tio, kion ĝi esploras, posedas ankaŭ siajn metodojn, do la manierojn laŭ kiuj ĝi esploras koncernan objekton. Kaj ankaŭ interlingvistiko, estante scienco, devas havi proprajn esplormetodojn.

Verdire necesa estus aparta priparolo de metodologio scienca ĝenerale, bedaŭrinde tio ĉi estas neebbla nun. Ni do devas nur substreki, ke ekzistas sciencoj tute apartaj, kiuj ne bezonas tute apartajn metodojn. Plimulto de sciencoj ne posedas siajn proprajn metodojn kaj neniu dubigas iliajn rajtojn por ekzisto (ekz. biokemio, utiliganta metodojn de biologiaj kaj fiziko-kemiaj sciencoj). Tial la divido de sciencoj laŭ la metodoj estas pli kaj pli malĝusta kaj ĉiam pli ofte oni dividas sciencojn laŭ la esplor-celoj, ekkonaj taskoj. Laŭ tiu kriterio koncerna scienco elektas por si metodojn tiajn, kiaj povas konduki ĝin al la fiksita celo. Tiel estas kun interlingvistiko. Ĉar la objekto de tiu scienco estas interlingvo (do lingvo) — ĝi bezonas utiligi lingvistikajn metodojn. Ĉar la objekto de interlingvistiko estas la ideo de interlingvo kaj interlingvaj movadoj — do ĝi bezonas metodojn de sciencoj historiaj-sociologiaj. Krome utiligeblaj estas metodoj statistikaj kiel helpaj al la supre nomitaj.

Sen enprofundi en analizadon metodologian ni haltu por momento ĉe la materialo, kiun povas esplori interlingvisto: Interlingvistikajn fenomenojn oni povas dividi je:

- lingva materialo prezentita en verkoj de aŭtoroj de interlingvoj (lernolibroj, artikoloj) aŭ, se tiaj mankas, en aliaj libroj;
- literaturo interlingva (libroj-romanoj, poezio, aliaj tekstoj — se estas);
- opinioj, onidiroj, antaŭjuĝoj, subtenoj;
- organizaĵoj interlingvaj;
- efektoj de la agado de la organizaĵoj kaj movadoj.

Tiujn fenomenojn oni povas rigardi el kelkaj vidpunktoj: lingvistika, sociologia, psikologia, ekonomia, soci-ekonomia, historia.

El la supra evidentiĝas, ke metodologio de interlingvistiko estas tiu branĉo, kiu povas ankoraŭ bonege evolui. Cetere ĝi estas branĉo, kiu nepre devas evolui kiel plej baldaŭ por fari esplorojn pli **efikajn** kaj pli utilajn, por ke la esploroj iru en la ĝusta direkto.

Konkludo

La supra skizo estas provo respondi la demandon, kiu estas des pli malfacila, ke ne ekzistas ankoraŭ profesio de interlingvisto, ke estas ankaŭ malfacile respondi la demandon: kiu estas interlingvisto, ke ne ekzistas sufiĉa literaturo scienca pri interlingvistiko krom kelkaj kompendioj kaj nemultaj artikoloj en la nacia kaj interlingva gazetaro. Sed malgraŭ tio ni devis konstati, ke eĉ se la okupiĝado pri interlingvistiko plenigas nur la liberan tempon ekster la profesia laboro, ĝi estas scienco, kies objekton, celon kaj metodojn mi provis montri al vi. Mi estas konvinkita, ke pli aŭ malpli frue, tiu scienco evoluigos. Tio estas postulo de la nuntempo, postulo pure scienca, kiu instruas al ni toleremon kaj estimon kontraŭ la vidpunktoj de ĉiuj, kiuj estas iamaniere ligitaj kun la problemo de interlingvo, kiu iom post iom solvata povos liberigi la homon de la historiaj kaj politikaj ŝarĝoj, sociaj kaj filozofiaj antaŭjuĝoj kaj povos doni al li eblon egalrajte utiligi la akiraĵojn de la homa kulturo.

SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio
Esperantista, Vol. 17, n-ro 1 (1966)

FREŜA VENTO EN LINGVOSCIENCO

(R. Sikorski, Omsk, Sovetunio)

En la scienca revuo »Voprosi jazikoznanja« numero I/1966, eldonata en Moskvo, aperis artikolo de V. P. Grigorjev »Pri kelkaj problemoj de interlingvistiko«. Jen estas ĝia enhavo en libera kaj nekompleta interpreto.

En larĝa senco de l'vorto interlingvistiko esploras ligojn kaj influojn inter diversaj lingvoj. La aŭtoro rememorigas pri kelkaj interlingvistikaj tezoj kaj oponas al kelkaj interlingvistikaj antaŭjuĝoj. Li emfazas gravecon de interlingvistikaj esploroj por estonta kulturo de la homaro. La plej grava tasko de interlingvistiko estas studoj pri la konstruitaj helpaj lingvoj. La aŭtoro plurfoje kaj favore mencias Esperanton. Li diras, ke se ankoraŭ ne ekzistas en Esperanto originalaj beletraj verkoj kompareblaj al la plej bonaj kreaĵoj de naciaj kulturoj, la kaŭzo estas antaŭ ĉio ekstera, sed ne interna... Esprimivaj rimedoj de lingvo ne estas malpropraj al konstruitaj helpaj lingvoj, kion atestas la historio de Esperanto... La vortaro de Esperanto konstante riĉiĝas...

Se »historio estas nenio alia ol aktiveco de homo strebanta al siaj celoj« (Marks kaj Engels, verk. 2, pĝ 102), do konstruita helpa internacia lingvo estas, laŭ tiu vidpunkto, esence produkto de historio, samkiel naciaj lingvoj.

Ne estas rajtigita principa kontraŭmeto de naciaj lingvoj kiel »vivantaj« al konstruitaj helpaj internaciaj lingvoj kiel »malvivantaj«... Esperanto estas sufiĉe vaste uzata kaj nemalofte anstataŭas naciajn lingvojn kiel ilo de internaciaj rilatoj.